# KOMENCANTO 8 '98

gazeto por komencantaj esperantistoj kaj komencantaj aŭtoroj

## redakcie

Karaj legantoj!

Venis al sia fino 1998. Antaŭ vi estas la lasta numero de ĉi-jaro. Pri niaj rezultoj kaj niaj planoj legu sur la dua paĝo. Kaj ĉi-sube ni publikigas familinomojn de niaj fervoraj kunlaborantoj - komencantaj aŭtoroj kaj tradukistoj, dank'al kies laboro nia gazeto iĝas interesa, utila kaj vere internacia.

RUSLANDO (regionoj)

Birjukova Ol. - Tomska
Ĝekson Iz. - Sverdlovska
Ĥajdarova Vi. - Baŝkirio
Ĥarina Al.- Novosibirsk
Jugajk Vl. - Tverska
Kacko St. - Kurgan
Kondakov Al. - Murmanska
Kostromin Sr. - Sverdlovska
Kononova Sn. - Omska
Leksina Ld. - Kurska
Morgun Ti. - Lipeck
Masjukas Al. - Murmansk
Nasonov Al. - Lipecka
Nekonatulo - Tatarstan
Ŝiŝkin Eŭ. - Niĵegorodska
Tolmaĉov L - Leningradska
Uspahoĝajeva Sv. - Arhang-a
Volkov Al. - Baŝkirio

TRA la TUTA MONDO

Åkerlund Ann-Louise - Svedio
Florian nad Metuji - Nederlando
Ĵanalieva Zuhra - Kazaĥio
Miles Peter - Britio
Petrov Maksim - Kazaĥio
*Pierrel Marie-To* - Francio
Santi Elena Bullo - Italio
Thorne Bill - Britio
Weijian Jian - Ĉinio

# FELIĈAN




# NOVJARON!

KOMENCANTO
1998 numero 8
fondita en 1992
8 numeroj jare
**redaktas kaj eldonas:**
Viktor Kudrjavcev
**konstanta kunlaboranto:**
Rafija Jafasova
**adreso:** 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
**elektronika poŝto :**
let@post.e-burg.su
**abontarifo** por 1999:
*internacia tarifo:*
24 nederlandaj guldenoj aŭ $12
*orienteŭropa kaj latinamerika tarifo:* $10
aŭ por ĉiuj — 15 IRK
**konto ĉe UEA:** vkud-a
*ruslanda tarifo:* 54 рубля
(за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

## PERANTOJ de "K"

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

AŬSTRALIO
Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W. 2036

ĈEĤIO
Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

ESTONIO
Virve Ermits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

ITALIO
Višnja Branković, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

POLLANDO
Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskego 77-137, PL-01-865 Warszawa

SVEDIO
SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

SVISLANDO
Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

UKRAINIO
Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

# ADIAŬ, 1998!

## REZULTOJ

Finiĝas 1998 jaro kaj venis tempo resumi nian laboron. Ni plenumis nian promeson kaj rakontis pri ĉiuj la plej gravaj amaskomunikiloj en la Esperanto-movado. Estis prezentitaj 7 internaciaj kaj 3 enlandaj asociaj revuoj, 2 radiostacioj kaj ĝenerala historio de la esperantaj AK.

Aperis 6 gramatikaj paĝoj kaj laŭ la reehoj ili estas necesaj kaj utilaj.

Entute por la unua fojo aperis 27 nomoj de komencantaj aŭtoroj el 7 landoj kaj 15 regionoj de Ruslando, inter ili kelkaj jam iĝis veraj amikoj de KOMENCANTO — certe menciindas *Bill Thorne* el Londono, [Britio] kaj *Ludmila Leksina* el Suĝa, [Kurska reg., Ruslando].

Aperis sufiĉe multaj desegnaĵoj, kiuj fakte agrabligis la aspekton de "K".

Rubriko KONKURSO iĝis sufiĉe populara. La unuan lokon inter publikigitaj enigmoj kaj rebusoj gajnis *Aleksandr Volkov* el Tolbazi [Baŝkirio, Ruslando]. Ni gratulas lin kaj sendos al nia aŭtoro promesitan libropremion — amuzan legolibron "Vivo kaj morto de Wiederboren", [eldonejo "Sezonoj", Jekaterinburg].

Entute aperis 136 adresoj de la dezirantoj korespondi el pli ol 40 landoj. Ni dankas niajn partnerojn — la francan korespondservon KORESPONDI kaj la ĉeĥan — INTERNACIA KORESPONDA ADRESARO, dank'al kies kunlaboro ni efektivigis tiom vastan areon de korespondemuloj.

Komencinte de 4 perantoj en la 1-a numero ni havas ilin jam 8 !

Ni dankas la redakciojn de La ONDO de ESPERANTO, La GAZETO, NORVEGA ESPERANTISTO, ESPERANTOLEHTI, La KANCERKLINIKO, JUNA AMIKO, INTERNACIISTO, kiuj afable kaj tute senpage aperigis sciigojn pri KOMENCANTO.

Apartan dankon al homoj, kies nomoj aperadis sur la 2-a paĝo pro la donacoj por la prospero de KONENCANTO.

Kaj fine — grandegan dankon al ĉiuj niaj legantoj! Ĝis la revido en 1999!

# SALUTON, 1999!

## PLANOJ

En 1999 ni planas aperigi same 8 numerojn. Kvanto da paĝoj evidente kreskos de 64 ĝis 72 aŭ eĉ 80.

Nia ĉefa celo restas la sama — fari KOMENCANTOn pli kaj pli interesa kaj utila por vi!

La dua, sed nemalpligrava celo estas duobligi la abonkvanton kaj la kvanton de la landoj, kie oni *abonos* KOMENCANTON, ekde nunaj 14 ĝis minimume 25. Tio estas ege malfacila tasko, ĉar KOMENCANTO vivas nur el la propraj rimedoj. Tial via reabono de nia gazeto vere helpos efektivigi niajn planojn.

La ĉeftemo por 1999 — "ESPERANTO kaj TURISMO". Ni rakontos pri praktika apliko de la internacia lingvo por vojaĝoj — ESPERANTOTUR, PASPORTA SERVO, partopreno en kongresoj kaj renkontiĝoj kaj certe personaj kontaktoj. La cetera enhavo restos pli-malpli sama, ĉar ricevitaj de vi, karaj legantoj, reehoj konvinkas nin, ke nia redakcia politiko estas trafa kaj plaĉa por vi.

**La 1-a numero de 1999 aperos la 20-an de januaro**

**12 numeroj jare, 52 paĝoj kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj**

# EL POPOLA ĈINIO

Unu el la plej popularaj revuoj en la internacia Esperanto-komunumo
Intima amiko de diverslandaj esperantistoj
Fenestro donanta rektan rigardon en Ĉinion
Ponto de komunikado inter mondaj samideanoj
Utila kaj praktika lernolibro de Esperanto

*— informoj pri la Esperanto-movado tra la mondo*
Esperanto-rubrikoj: Esperantaj novaĵoj, Ĉinaj Esperantistoj, Originale verkitaj, por komencantoj, Inter Ni, Sur nia librobreto.
*— aktualaj raportoj pri la progreso kaj socia kaj popola vivo de nuna malferma Ĉinio;*
*— nteresaj artikoloj pri la tradicia kulturo, historio, literaturo, arto, medicino, filozofio de ekzotika Ĉinio*

## iom el historio de "El Popola Ĉinio"

En majo de 2000 jaro El Popola Ĉinio festos sian 50-jaran jubileon. Kaj ĉio komenciĝis en malproksima de ni 1950 jaro.

Rememoras honora membro de UEA kaj vicprezidanto de Ĉina Esperanto Ligo ZHANG QICHENG:

"En 30-aj jaroj dum la liberiga rezistomilito en Ĉinio la progresemaj kaj patriotaj esperantistoj levis la aktualan devizon:" Per Esperanto por la Liberigo de Ĉinio!" En tiu periodo estis eldonataj periodaĵoj "Ĉinio Hurlas", "Voĉoj el Oriento", "Orienta Kuriero", "Heroldo de Ĉinio"., kiuj altiris atenton mondskale dank'al aktiva laboro kaj rezulte gajnis popularecon inter la intelektuloj kaj revoluciaj gvidantoj.

Post la fondiĝo de popola respubliko dank'al la favoro de nia registaro ni havis avantaĝon pliprogresigi Esperanto-movadon, kaj antaŭ ĉio pensis aperigi Esperantan revuon.. por informi la eksterlandanojn pri la diversaj aspektoj de la nova Ĉinio. Unu el la redaktoroj de la nove fondinta Fremdlingva Eldonejo en Pekino okazis mi kaj tutnature venis al mi la ideo uzi Esperanton. Dank'al helpo de multaj potenculoj, favorantaj al Esperanto kaj konsento de tre gravaj kaj estimataj esperantistoj kiel Venlo Fon kaj Honfan, la redakcia teamo estis kompilita kaj post kelkmonata streĉa laboro ni estis tute pretaj inaŭguri la revuon kaj ĝi aperis kvazaŭ ekbrilanta stelo super la horizonto de Esperantujo.

Kompare kun la nuna brila aspekto la unua revuo estis tre modesta. La ĉefa celo estis liveri interesajn materialojn por ili estu utiligataj en alilandaj nacilingvaj gazetoj. Tiam ni nomis nian periodaĵon informa bulteno kaj donis al ĝi simplan nomon "El Popola Ĉinio". EPĈ bone kreskis kaj nun fariĝis unu el la plej ŝatataj revuoj en Esperanto.

### ABONOJ

Abonprezoj varias laŭlande. Abonebla ĉe la landaj perantoj aŭ ĉe UEA Konto: **elpc - e**
Prospekto havebla ĉe la Distribua Fako de *El Popola Ĉinio* Ĉiuj informoj ĉe :

**P.O.Kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio**

En Rusio ĉe Halina Gorecka: 620077 Jekaterinburg-77, ab.ja. 67, Ruslando: rubla ekvivalento al $16

Santi Elena Bullo
Via D'Alviano n 19
30173 MESTRE-VE, Italio


## Apud la telefono

Dum mi atendas
sidanta apud la telefono
ke vi min vokas,
malgranda kato,
malice flegma, min observas.
Mi mansignas, ĝi rapide
sur miajn genuojn eksaltas.
Plezure mi ĝin karesas,
ĝi plezure dankas
per sonora ronrono...

***

## Ameme

Kiam malgranda kato
ĝiajn flavajn okulojn
al mi turnas, kiel sago
ĝia rigardo min trapikas,
Tia flamokerno ŝajnas
mistere forflugi
de ĝia profunda koro.
Estas mi tiam kiu emocie
miajn okulojn fermas.

***

## Norda vento

Dum la norda vento
blovas kaj senpaŭze frapas
al fenestroj aŭ pordoj
mi suferas pro via foresto.
En la intimeco de la hejmo
brilas la lampoj en la studoĉambro.
Nur far vi, al mi restas
leteroj, folioj, fotoj, libroj...

pentris *Kononova Cnjeĵana*,
[NIĴNJAJA OMKA, Omskaja obl.,


Ĥarina Alla
Novosibirsk, Ŝirokaja, 3-98, 630108, Rusio


# Tiuj liberaj papilioj

*Tie neĝo degelis apenaŭ falinte,*
*Tie treme enspiro ĉesiĝis,*
*Teraj homoj, ĉielon ĵus ekmalglorinte,*
*Pri pardono al Dio jam preĝis.*

*Tie premis animojn la domoj tro multaj,*
*Koran frapon amaso surdigis,*
*Kaj neniu ekflustros vin: "Hola, aŭskultu!",*
*Kaj neniu "atendu!" al vi diros.*

*Jen el tiu prizono, el senlibereco,*
*El blindeco kaj ombro de muroj,*
*Tute ne ektiminte frenezan altecon,*
*Papilio forflugis senspure.*

*Liberecon savantan avide glutinte,*
*Per flugiloj eksvingis pli forte...*
*Papilioj tutmondaj alflugis, aŭdinte,*
*Komprenintе tuj ĉion sen vortoj*

*L'papilioj flugadis al nuboj arĝentaj,*
*Suben penis jam plu ne rigardi,*
*Kun kvieta kanzono, verkita per vento,*
*Homajn sonĝojn decidis nun gardi.*

*La kanzono animojn purigis nemulte*
*Kaj fajreron d'boneco bruligis,*
*Kaj subite ekflustris iu:*
*"Hola, aŭskultu!"*
*Kaj subite "atendu!" iu diris*



*Ĥarina Alla*

*Izabella Ĝekson* (studas en elementa kurso ĉe Viktor Kudrjavcev) [KAMENSK-URALSKIJ, Sverdlovskaja reg., Rusio]

# FAJRETOJ

Iam delonge en malluna aŭtuna vespero mi navigis laŭ malgaja siberia rivereto. Subite antaŭe ĉe riverkurbiĝo sub la mallumaj montoj ekbrilis fajreto.

Ĝi brilis klare, forte, tute proksime.

— Nu, glor' al Dio! — mi diris kun ĝojo. La dormloko estas proksime.

Mia remisto sin turnis, ekrigardis transŝultre la fajreton kaj denove apatie surpremis la remilojn.

— Malproksime!

Mi ne kredis tion: la fajreto lumis, aperante el nedifinita mallumo. Sed la remisto estis prava: certe, la fajreto brilis malproksime.

Noktaj fajroj ĉiam ŝajnas proksimaj — ili venkas mallumon, ili brilas kaj promesas kaj allogas per sia proksimeco. Ŝajnas, jen, ankoraŭ du-tri movoj per remiloj kaj la vojo estas finita... Sed tio nur ŝajnas!...

Kaj longe ankoraŭ ni iris laŭ la nigra, kiel inko, rivero. Montfendoj kaj rokoj alfluiĝis, proksimiĝis kaj defluiĝis, restante malantaŭe kaj verŝajne, perdiĝante en senfina foro, kaj la fajreto tiasame lumis antaŭe, ŝanĝebrilante kaj allogante tiel same proksime kaj tiel same malproksime.

Mi ofte rememoras nun kaj la malhelan riveron, ombrigitan de rokaj montoj, kaj la viglan fajreton. Multe da fajroj kaj pli frue kaj poste allogis ne solan min per sia proksimeco. Sed la vivo fluas inter tiaj samaj obskuraj bordoj, kaj la fajroj estas ankoraŭ malproksimaj. Kaj ree oni devas surpremadi je remiloj...

Sed tamen... Tamen antaŭe estas la fajroj!..




pentris *Kononova Cnjeĵana*,
[NIŬNJAJA OMKA, Omskaja obl., Ruslando]

# INTER-PARODIE

*Ludmila Leksina*
[SUDĴA, Kurskaja obl,]

## Al uro de Vipuro

Ne havas mi kruron,
Ne havas femuron,
Ne havas kulturon,
Ne havas forturon!
Mi havas humuron:
Mi havas teruron.
Ho, kia plezuro!
Serpento Vipuro.



*Bill Thorne*
[LONDONO, Britio]

Ho, Juna virino Ludmila
Ŝi estas poeto simila.
Prizorgas ŝi katojn
Hundon, ( eĉ ratojn ?),
Do, viv' por ŝi estas
trankvila.

# KONKURSO


*Petrov Maksim*
[Pavlodarskaj obl., AKSU, Kamzina 31-63 Kazaĥstan]

## Enigmo

pri kio temas?

Mi estas tie, kie gaje;
En ludo, kie estas gajno,
En homo, kiu tion gapas,
Havaĵon ies kiu gardas.
Mi estas en milita glavo,
En haroj de maljuna avo,
En pano, kiu kampe kreskas
Ĉu scias min? Ho, mi .... estas

*Aleksandr Volkov*
[TOLBAZI, Baŝkirio]




En ĉiu kadro estas ĉifrita aparta vorto

## rebusoj

<u>RESPONDOJ al la KONKURSO el la 6-a numero de KOMENCANTO</u>
KRUCVORTENIGMO: *horizontale*. 1.kandelo 2 rombo 3 afiŝo 4 fratino; *vertikale*. 1 hundo 2 tamburo 3 plafono stelo
ŜERCAJ ENIGMOJ: 1 vivas la kvaran 2 kiam la pordo estas malfermita 3 al la alia duono 4 sub malseka 5 dormas 6 volas montri, ke kantas parkere 7 mi mem 8 kaj 9 ok 10 kiam lin mordas hundo
SERIOZA TASKO:
en,po,tra,tre,tro,pro,ano,per,pere,rano,sano,raso,tero,nepo,reto,sane, arto,patro,penas,penos,petas,petos,ponte,parto,porta,peano,espero.

# ANEKDOTOJ

*el vivo de lernejanoj*

***

— Ĉe nia instruistino estas tre malbona memorkapablo.
— Ĉu ĉion forgesas?
— Ne, ĉion memoras.

***

— Ivanov, respondu, kial vi malfermas la okulojn, kiam legas?
— Pro la plezuro.

***

— Ivanov, — demandas instruistino de biologio, - bonvolu respondi, — ĉu ĉiuj fungoj estas manĝeblaj?
— Jes. Sed iuj el ili nur unu foje!

# AFORISMOJ

kolektis kaj esperantigis *Stanislav Kacko* [KURGAN, Rusio]

* Vivu tiel, ke viaj infanoj, pensante pri justeco kaj honesto rememorus pri vi *(Ĝekson-Braun-pli juna)*

* Homoj aspiras (ŝatas) ekonomion kaj pretas pagi kiom ajn grandan prezon por ĝin atingi *(Li Jakokka)*

*Sergeo Kostromin*
[KRASNOURALSK, Sverdlovskaja obl., ]

*Esperanto similas al fluantaj sabloj — se ĝi *alsuĉas* vin, do, serioze kaj por longe

# Leter✉kesto

✉
Estimata Viktoro!
...Ni nepre abonos vian gazeton por la sekva jaro.
*Sergeo Bronov*, KRASNOJARSK,


✉
Kara amiko,
Ni ricevis la revuon KOMENCANTO 5, ... kaj legis prezenton de Ĉina Radio Internacia. Koran dankon!
Via revuo estas tre interesa kaj vere utila al esperantistoj, ĉu komencantaj ĉu nekomencantaj.
*Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia*, Beijing, Ĉhina.

✉
Kara samideano,
Kiel nova abonanto de via bonega gazeto mi volonte deziras re-aboni por 1999. Mi havas proponon pri la "kapo" de gazeto. Nun la teksto "KOMENCANTO" kiu ŝajnas iomete teda. Kial ne doni al la legorondo komkurson konstrui novan tekstokapon kun premio ? Mi instruas komencantojn en la gimnazio ĉi-tie en HELSINGBORG kaj ofte uzas materialojn el KOMENCANTO.
*Kjell Randehed*, Helsingborg, Svedio.

✉
Estimata mia instruisto Viktor Vasiljeviĉ!
Dank'al apero de mia adreso en KOMENCANTO al mi venis kelkaj leteroj... El Francio, el Usono, kelkaj venis el Ruslando, skribas aĝaj homoj... Dankon al vi, benu vin Dio!
forĝisto *KUCEV Ivan Nikitoviĉ*, Rusio, 658549, Altajskij kraj, Rebrihinskij r-n, ZELJONAJA ROŜĈA,

✉
Via gazeto kaj viaj rezultoj al mi tre plaĉas. Mi gratulas vin!
*ŜUVAJEV Timofej Dmitrijeviĉ*, NIĴNEVARTOVSK, Tjumenskaja reg.,

# La ONDO DE ESPERANTO



*La Ondo de Esperanto* estas ĉiumonata soci-kultura revuo. En ĉiu kajero de *La Ondo* oni povas legi beletron originalan kaj tradukitan, precipe tradukojn el la rusa lingvo.

Ekzemple, jam aperis tradukoj el Aleksandr Blok, Valerij Brjusov, Iosif Brodskij, Miĥail Bulgakov, Anton Ĉeĥov, Fjodor Dostojevskij, Nikolaj Gumiljov, Sergej Jesenin, Vladislav Krapivin, Miĥail Lermontov, Vladimir Majakovskij, Bulat Okuĝava, Boris Pasternak, Aleksandr Puŝkin, Aleksandr Solĵenicin, Vasilij Ŝukŝin, Ivan Turgenev, Vladimir Vysockij kaj multaj aliaj.
***Provekzemplero ricevebla kontraŭ 2 respondkuponoj aŭ kontraŭ poŝtmarkoj (5 rubloj) ĉe la redakcio: RU-620077, Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando.***

# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "K" - senpage

*Esperanto-grupo de orfejo (11-14 j.)*
deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj
Detskij dom 59,
ul. Vavilova, 60
KRASNOJARSK, 660059
RUSIO

*Mario L. Ruis Karell*
35 jara sport-instruisto
bk.,pm., moneroj, monbiletoj pri E-to kaj sporto, muziko
Apartado 14012, Mnao.
14,Co. de la Habana,
11400, HAVANO,
KUBO

*Ramon Molera*
11 jara knabo, poŝtmarkoj pri sporto . .j bestoj
C/Nord, 49-casa
62-ES-08950,
Esplugues de Llobregat,
HISPANIO

Membroj ( 12-40 jaraj)
de la Esperanto Sekcio
de Christ King College
tutmonde pri diversaj temoj
U.Zeiter Perera, Esperanto-Sekcio, Christ King College,
TUDELLA, JAELA,
SRILANKO

Interpretistoj de
*Scienca Saĝa Esperanta Anglalingva Klubo*
dez.kor..esperante, angle, ruse kun lernantoj pri ĉiuj temoj
228 Scienca Halo,
171 Lianxin Lu, Guangzhou
CN-510050,
ĈINIO

## 1999
## Via abono por via kaj nia bono!

Universitataj esperantistoj
kun alilandaj universitataj esperantistoj por interŝangi desegnaĵojn kaj esperantaĵojn
P.O.Box 75135-1133,
BOUSHEHR,
IRANO

*Guan Jingshan,*
11 j., lernantino pri lernado, pianludo, naĝo k filatelo
10-302, Poŝto 19, 24
Huanghua Lu,
Guangzhou,
CN-510010
ĈINIO

*Afshin Rasoulian*
26 jara studento,
tutmonde pri ĉiuj temoj
No. 14, Homayun Line,
SH. Rajayi Street,
IR-69156,
BORUJERD,
IRANO

Zhou Zhihui
12 j., kun lernantoj pri ĉina ŝako, astronomio, lingvoj, geografio, sporto
6-5-711, Huanghua Lu,
Guangzhiu,
CN-510050
ĈINIO

f-ino *Margarit Guldin*
pri turismo kaj Esperanto
Muntest 1,
CH-3008
BERN
SVISLANDO

s-ro *Eddy Silva Molina*
interesiĝas pri disvastigo de Esperanto
Clinica Santa Maria
3 cuadras al sur, B San Jose Oriental
MANAGUA
NIKARAGVO

*Babak Rasoulan*
27 jara magistro de angla literaturo pri literaturo, filozofio, psikologio, kino
P.O.Box 165, IR-69135
BORUJERD
IRANO

s-ro *Wen Gang*
kun esp-istoj 20-70 jaraj pri komerco, turismo, kulturo, ĉina medicino, filatelo ktp.
356, Beijing Donglu,
Sheng Jijie Shigong Gongsi,
330029 Nanchang,,
Jiangxi,
ĈINIO

s-ro *Oskar Sher*
aktiveco de Esperanto-kluboj
75 Bronkhorst Street
Groenkloof, 0181,
PRETORIA
**SUDAFRIKA RESPUBLIKO**

KORESPONDI...listo de dezirantoj korespondi en-havas pli ol 45 adresojn Sendu vian anoncon por senpaga enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonaĵon vi ricevos sen-dante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.
R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIO

**Volgia Esperanto Renkontiĝo** 21-25 de aprilo 1999
Riĉa programo, ekde muzeo de pentristo Ŝiŝkin ĝis tatara popola kuirarto...Detalojn petu ĉe la klubo "Gaja krokodilo" en *Naberejnije Ĉelni, 423819, a.ja. 133 Tatarstan, Rusio*

